
2.ª Ep. AÑO X N.º 58 (194) NOVIEMBRE - DICIEMBRE 1972

# Boletín

## DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO



ĜOJAN KRISTNASKON KAJ
FELIĈAN NOVAN JARON

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

*Director:*
Domingo Martínez Benavente
*Redacción y Administración:*
Inés Gastón
Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
ZARAGOZA

*ADRESOJ*

Federación Española de Esperanto
(Hispana Esperanto-Federacio)
Oficina Central:
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-8

Prezidanto:
S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Sekretario:
S-ro Manuel Figuerola Palomo
Str. Arturo Soria, 192, 3.º - D
MADRID-17

Kasisto:
S-ro Gerardo Flores Martín
Str. Presidente Carmona, 2
MADRID-20
Ĉekkonto: N.º 8362-271
Banco Español de Crédito
Str. Diego de León, 54
MADRID-6

Libroservo:
Federación Española de Esperanto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-8

Informa-servo:
Federación Española de Esperanto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-8

Eldona Fako:
F-ino Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
Ĉekkonto: N.º 17917, Bc. Bilbao
Coso, 31 ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 120 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## de Secretaría

La Junta Directiva de la Federación Española de Esperanto, en su reunión ordinaria de 29 de septiembre de 1972, acordó reorganizar el servicio de información a Prensa, Radio y Televisión, de la Federación, que de ahora en adelante radicará en la Oficina Central de la Federación en Madrid, quedando bajo la dirección del Presidente de la Federación, D. Angel Figuerola Auque. También se acordó hacer constar el agradecimiento de la Federación a D. Salvador Aragay Galbany, de Barcelona, por la labor realizada al frente de dicho servicio.

*"Dumvivaj Membroj"*

Tomás Ortiz García ...... **Madrid**
Manuel Casanoves . ...... **Barcelona**

DONANTES DEL FONDO DE ADQUISICION LOCAL EN PROPIEDAD
(F. A. L. P.)

| | Pesetas |
|---|---|
| *Saldo anterior* ... ... ... | 139.000 |
| Miguel Gustavo Díez y Diez ... | 1.000 |
| Faustina Martínez Guillén . ... | 500 |
| *Total* ... ... ... ... ... ... | 140.500 |

Madrid, a 9 de octubre de 1972.
*Manuel Figuerola Palomo*
Secretario de la Federación
Española de Esperanto

## deziras korespondi

HISPANUJO. — La Cuesta (Tenerife), B.º de La Candelaria, calle 26 de Diciembre, 19, Carmen Dolores Delgado Ruiz, 14-jaraĝa deziras korespondi kun samideanoj el diversaj landoj.

ĈEĤOSLOVAKUJO. — Halic - OZS, ekr. Lucenec, Doktoro medic. Michal Rovder, deziras korespondi kun hispanaj esperantistoj.

POLLANDO. — Lódz, ul. Gvówna 56-5, S-ino Janina Bartoszko, deziras korespondi kun hispanaj samideaninoj.

**Recordamos a todos los federados, el importe de la CUOTA ANUAL de los miembros de la Federación en sus distintas categorías:**
Miembro abonado: 150 Ptas.
Miembro protector: 300 Ptas.
Miembro numerario: 75 Ptas.
Las dos primeras categorías con derecho al recibo de un ejemplar del BOLETIN.

# KANTO DE LA ANĜELOJ, POR KE LA BEBO JESUO NE PLORU

Ro, ro, ro,
nia Dio, Redemptor':
ĉar vi larmas la Virgin'
sentas pikon de dolor'.
Ro, ro, ro.

Bebo, Filo de la Dio,
kiu patras super ĉio:
se larmado via ĉesos,
de l' Patrin' ne fontos plor',
ĉar ŝi naskis sen dolor'.
Ro, ro, ro.

Ne vi ŝin afliktu do!
Baj, etulo, ro, ro, ro,
nia Dio, Redemptor':
ĉar vi larmas la Virgin'
sentas pikon de dolor'.
Ro, ro, ro.

*Gil Vicente*
(1470 - 1539)

Etimologie, Biologio estas la scienco pri la vivo-fenomeno kaj ĝiaj diversaj formoj. Kiel studo-temo ĝi orientiĝas al la serĉado same pura kiel aplikata. La pura esploro estas tre ampleksa: de la ĥemia biologio (bioĥemio) kaj mikroskopio (virusologio, bakteriologio, citologio... ktp.) ĝis la studado de la grandaj vitalaj kompleksoj (ekologio) situantaj en konkreta teritorio kun siaj riĉaj interrilatoj.

Ĉi tiuj studoj pli-malpli baldaŭ havas konkretan aplikon al proponitaj sed ne solvitaj problemoj: lukto kontraŭ malsanoj, agronomia kaj grega pliboniĝoj, plibonigo de la medio, atingo de superaj aŭ pli produktantaj animalaj kaj vegetalaj rasoj, ekstermado de plagoj... ktp.

Kiel ekzemplon ni citos la valorajn aplikojn, kiuj nuntempe montriĝas de ia scienco, kiu komence ŝajnis pure teoria: la Ekologio. Celo de la Ekologio estas la studado de vivaj estaĵoj konsiderataj ne kiel izolitaj entoj sed rilatantaj unu kun la alia (ĉu de sama, ĉu de malsama speco) kaj samtempe kune rilatantaj kaj interŝanĝantaj kun la propra medio, kaj konsistigantaj dinamikan ekvilibron subtenatan de tre konkretaj leĝoj. La homo —kiu biologie konsiderata ankaŭ okupas unu aŭ kelkajn ekologiajn niĉojn— kelkfoje modifas tiun ekvilibron kun pereiga rezulto, kiu efikas malfavore al li. La atmosfera polucio, la venenigo de la riveroj, la —ĝis nun progresanta— malapero de animalaj kaj vegetalaj specoj, la malabundo de nutraĵoj en kelkaj landoj, estas sekvo de tiu malekvilibriĝo, de la ofta trouzo, fare de la homo, de la tero destinita al li. Ni ne deviis de la temo. La Biologio kaj la biologoj povas kaj devas labori taĉmente kun aliaj profesiuloj kaj sin okupi pri tiu problemo, kiu —pli-malpli konscie— maltrankviligas la nuntempan homon.

La konkludoj de la Konferenco okazinta en Stokholmo por la protektado de la Naturo fiaskis unu plian fojon pro kolizio kun la politikaj problemoj. Sed ili restas: "la tero estas nur unu" kaj, kion ni atendas por plibonigi aŭ almenaŭ konservi ĝin?

Ni estu optimistaj kaj esperu ke fine la lumo brilos inter tiom da konfuzo kaj ke ni scios konservi same por ni kiel por niaj posteuloj, teron kie oni povos pli bone vivi.

12 septembro 1972

*María J. Sancho kaj R. Fanlo*

## ESPERANTISTA VIVO

### EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ EN CALELLA (Barcelona)

Dum la somero, okaze de la ferioj, loĝis en Calella kelkaj samideanoj el eksterlando. Okaze de la vizito, la gemembroj de la Grupo, kunvenis en la sidejo de la Kooperativo "La Amikeco", por konversacii kun la gastoj, kaj poste ĉiam okazis gaja trinkado en la restoracio "Kim" de samideano Villaret.

### PILGRIMO AL CZESTOCHOWA (Pollando)

Dum kelkaj tagoj de la monato aŭgusto, grupo de 50 personoj de Calella kaj Barcelona, kiujn gvidis P. J. M. Claramunt, organizis la unuan hispanan pilgrimon al la Sanktejo de la Patronino de Pollando en Czestochowa. Kiel memoraĵon de la vizito, la hispanoj, donacis grandan statuon de Nia Sinjorino de Montserrat. Dum la vojaĝo P. Claramunt salutis multajn esperantistojn en Hungarujo, Pollando kaj Ĉeĥoslovakujo.

# TAGO DE LA LIBRO EN ESPERANTO, TAGO DE ZAMENHOF

La Tago de Zamenhof alproksimiĝas kaj sekve la tago de la Libro en Esperanto. Unu plian fojon mi ripetas mian alvokon pri la bezono multe legi se ni deziras bone lerni la lingvon kaj samtempe la kulturon kaj morojn de aliaj popoloj.

Dum la jaro multe ni legis rilate al la libro. La 1972a-jaro estis deklarita Internacia Libro-jaro. Ĉu ni klopodis riĉigi nian bibliotekon per la akirado de libroj kaj nian intelekton legante ilin?

La legado invitas nin al lernado kaj helpas nin al supereco. Ĉu vi konas personon, kiu neniam aĉetis libron? Ni ĉiuj trovis en la libroj novajn ideojn kiuj tuj akordiĝis kun nia sento. En ili ni trovis kulturan trezoron; misteran legendon, romantikan poemon... kaj ankaŭ spritaĵojn kiuj gajigas nian maldiligentecon.

La homa intelekto fariĝas el ideoj; fremdajn ideojn ni devas kompari kun la niaj, por tiamaniere superigi nin; por tio, nenio estas pli interesa ol la legado. Pere de la libroj ni kontaktiĝas kun aliaj popoloj, ni konas ilin, interesiĝas pri ili kaj ni amas ilin, kio estas la fundamento de nia esperantismo.

La libro estas grava interkomunikilo. Nuntempe, la romano ne povas nur pritrakti aventurojn nek amajn historiojn laŭ la fantazio de la aŭtoro. Kiam la literaturisto redaktas verkon li devas atesti pri la tempo en kiu li vivas kaj fari pere de sia verko homan kaj vivan historion pri ĉio, kio lin ĉirkaŭas. Ne estas facila tasko verki interesan libron, super ĉio, interesan libron por ĉies intelekto. La aŭtoro pere de sia verko devas transsendi al la leganto sian mesaĝon, oferi sian emocion per vortoj kaj ideoj realaj; tiamaniere la leganto interesiĝas pri problemoj kiuj foje ankaŭ lin koncernas, kaj oni trovas en la libro la spiritan pacon, kiu tiom helpas por daŭrigi la vivo-vojon nuntempe.

La Tago de la libro en Esperanto estas la 15-an de decembro, Tago de Zamenhof. Honore al li, ni aĉetu almenaŭ unu libron en la Internacia lingvo. Oni povas elekti inter multaj, sendube lernigaj.

*Red.*

---

## ESPERANTO-MOVADO EN MAHON (Menorca)

Ĉiam kun kreskanta entuziasmo, la esperantistoj de Mahón (Menorca) daŭrigas sian laboron kaj ili esperas starigi denove Esperanto-Grupon en tre baldaŭa estonto.

Gvidas la kurson kaj ĝenerale la Esperanto-movadon en la insulo, S-ro Antonio Tuduri, —str. Anuncivay, 21, Mahón—, tre kapabla esperantisto, kiu tutcerte revigligos la movadon en tiu bela insulo, konstante vizitata de multaj turistoj, inter kiuj, esperantistoj, kiujn niaj tieaj samideanoj akceptas tutkore.

## ESPERANTO EN MIERES (Asturias)

La esperantistoj de Mieres daŭrigas sian konstantan laboron favore al Esperanto. La 10-an de oktobro oni komencis kurson de Esperanto en Ujo, apud Mieres, en la ĵus starigita Teleklubo de Ujo; gvidas la kurson S-ro Cienfuegos, helpate de S-ro Vergara.

En la ĵurnalo "Nueva España" aperis artikolo pri la Esperanto-movado, okaze de la komenciĝo de la nova kurso.

Bonan sukceson en via laboro kaj... Ĉiam antaŭen!

# 57° CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO EN PORTLAND

*Impresiones de un congresista*



A pesar de celebrarse el Congreso Universal de 1972 a más de 11.000 km. de España, tres miembros de H.E.F. nos decidimos a participar en el mismo.

La intención era ir a Portland en el viaje organizado por "Hispana Turisma Esperanto-Sekcio", pero debido al escaso número de inscritos, el viaje colectivo no tuvo lugar. En vista de ello preparamos el plan de viaje por nuestra cuenta, y a las 11,30 horas del día 27 de julio, emprendimos el vuelo hacia la ciudad de Nueva York, primera etapa del largo viaje que habíamos proyectado. Nuestro reloj indicaba las 20,00 h. cuando aterrizamos en el aeropuerto Kennedy de Nueva York, pero los relojes del aeropuerto nos mostraban las 16,00 h. Habíamos ganado cuatro horas que deberíamos tener en cuenta durante nuestra estancia en los Estados Unidos.

La llegada a Nueva York es una verdadera prueba para la paciencia y los nervios de los viajeros. Desde la llegada hasta que salimos del aeropuerto hacia el hotel transcurrieron cinco horas. El equipaje tardó más de una hora en llegar a la plataforma de recogida y dos horas más fueron necesarias para cumplimentar los trámites de las autoridades de emigración y aduana.

Nuestra intención era continuar el vuelo a Chicago tres horas después de nuestra llegada; pero debido al tiempo transcurrido en trámites burocráticos perdimos dicho vuelo y hubo que pernoctar en Nueva York. La Compañía de Aviación por la cual viajábamos se hizo cargo de todos los gastos. Fuimos alojados en un lujoso hotel de las proximidades del aeropuerto Kennedy.

A las 7 de la mañana del día siguiente nos trasladaron gratuitamente al aeropuerto Laguardia desde donde reemprendimos el viaje hacia Chicago.

Durante el trayecto vamos observando el terreno que se desliza bajo nuestros pies. Desde el aire se ve perfectamente la gran riqueza de esta región a la que se denomina "el granero de los Estados Unidos".

Cuando algún mar de nubes se extendía bajo las alas del avión, la visión de la tierra era nula, pero era maravilloso observar las fantásticas figuras de algodón blanquísimo o los imaginarios paisajes nevados que forman las nubes, vistas por encima y bañadas por los rayos del sol.

Pronto divisamos el lago Michigan en cuyas orillas se extiende la industriosa ciudad de Chicago. A esta bella e interesante ciudad solo pudimos dedicarle poco más de un día, por falta de tiempo, ya que el Congreso empezaba al día siguiente. No obstante visitamos gran parte de la ciudad por medio de un "Tour" que durante cinco horas nos fue mostrando lo más interesante de ella.

Digno de mención por sus magníficas instalaciones es el Museo de Ciencias al que por desgracia tan solo pudimos dedicarle una hora de la gira. El barrio antiguo con sus típicas *taverns* y sus

construcciones del siglo XVIII, tiene un encanto especial. Innumerables son las tiendas dedicadas exclusivamente a la venta de artículos para la juventud, incluidos los utensilios usados por los drogadictos.

En Chicago ya observamos el importante papel que juega el automóvil en la vida del norteamericano. Infinidad de locales y terrenos están dedicados para el aparcamiento de los miles de grandes y lujosos automóviles que llenan las anchas calzadas de la ciudad. Escaso número de viandantes se ven por las calles y con frecuencia a lo largo de todas ellas, los únicos peatones somos nosotros.

Durante el paseo por los parques observamos la gran afición que existe por el ajedrez. Cientos de tableros para este juego se hallan instalados por todos los rincones de los parques; en algunos de ellos se ve gran número de espectadores en torno a los jugadores.

A las 15,30 h. del día 29 abandonamos esta ciudad para reemprender el vuelo que nos ha de llevar a la meta de nuestro viaje: Portland.

Llegamos a las 18,00 h. y nos trasladamos directamente a la "Kongresejo" instalada en el hotel Hilton; aquí se nos entrega la documentación de congresista y la de alojamiento.

Desde el primer momento de nuestra llegada encontramos amigos, conocidos en anteriores congresos. Este encuentro, como siempre, es el momento más emotivo del congreso. Efusivos abrazos, intercambio de saludos, informaciones familiares, etc., hacen de la noche del sábado una de las más agradables reuniones del Congreso.

El domingo a las 10,00 h. tuvo lugar en el gran salón del hotel Hilton la solemne Apertura del 57.º Congreso Universal de Esperanto, al que asistieron autoridades de Portland, representantes diplomáticos de varios países, directivos de U.E.A., delegados de más de cuarenta países y alrededor de 800 congresistas.

Los diferentes servicios religiosos tuvieron lugar por la tarde en las iglesias católica, presbiteriana y budista, ya que había congresistas de diversas religiones.

Por la noche tuvo lugar la "Usona Vespero" en la que se ofreció un verdadero mosaico de típicas danzas y cantos del Estado de Oregón. Todas las actuaciones fueron largamente aplaudidas por los asistentes que llenaban el salón.

Durante toda la semana se celebraron reuniones de trabajo por los miembros de las distintas secciones, en las que se debatieron temas de interés general. Particularmente interesantes fue-



Orfeón de Portland

ron las dos Asambleas Generales. Temas principales de dichas asambleas fueron: "El Informe Anual de las actividades de U.E.A." y "El Turismo Mundial y la diversidad de lenguas".

El jueves día 3, la mayor parte de congresistas participaron en las excursiones que se organizaron para visitar puntos interesantes de las cercanías de Portland. Nosotros elegimos la excursión al monte Hood. Su majestuosa belleza ya se divisa bastantes kilómetros antes de llegar a él. Por una magnífica y amplia carretera fuimos ascendiendo desde las orillas del río Columbia hasta la estación invernal de "Timberline Lodge" cerca de la nevada cumbre del monte Hood.

Después de visitar este centro de esquí y admirar el maravilloso paisaje que se divisa desde esta altura, regresamos bordeando el río Columbia.

Cerca de la presa Bonneville paramos a comer en un restaurante en donde nos deleitaron con la especialidad de esta región: el salmón. A lo largo del río y especialmente cerca de la presa, existen magníficos ejemplares de este sabroso pescado.

Regresamos a Portland a través de bellos bosques de abetos y gigantescos pinos Secoyas; alguna vez la carretera se abre paso a través del tronco de uno de estos enormes árboles de más de 100 metros de altura, pasando un gran automóvil fácilmente a través de él. A derecha e izquierda observamos imponentes saltos de agua que, desde gran altura, se precipitan al lado de la carretera para ir a morir al río que discurre junto a nuestra ruta.

Junto a la presa Bonneville existe el centro de investigación y control para la conservación y recría de los salmones. El centro está magníficamente dotado de modernas instalaciones que lo hacen uno de los más modernos y avanzados en su género.

El viernes se celebró en el gran salón del hotel Hilton, el Banquete Oficial, y a continuación un animado baile al que asistieron invitados de la ciudad de Portland y en el que lucieron sus mejores galas todos los congresistas.

Finalmente, el sábado día 5, tuvo lugar la Clausura. Con este emotivo acto dimos por finalizada la participación en el 57.º Congreso Universal de Esperanto. Efusivas despedidas entre los congresistas y preparativos de marcha fueron el colofón a este Congreso celebrado en la bella ciudad de las rosas: Portland.

En el transcurso de una semana hemos vivido un poco al ritmo de la ciudad. Ella nos mostró distintas facetas: por un lado disfrutamos contemplando los bellísimos parques y jardines de los que la ciudad está dotada en gran cantidad. Un barrio ultramoderno proyectado y construido con miras a la futura ciudad de Portland del año 2050, nos mostró con cuanta anticipación construyen sus ciudades los norteamericanos. Digno de elogio es el gran parque forestal enclavado en un extremo de la ciudad, el cual aloja un jardín zoológico modelo de instalación en plena naturaleza. El viaje a través del parque se efectúa en un moderno y aerodinámico trenecito que nos deja en el centro mismo del Zoo.

Muy interesante por sus espectaculares salas, es el Museo de Ciencias del Espacio; en él se pueden vivir simuladamente maravillosas aventuras espaciales con solo oprimir un botón. Varias horas son necesarias para poder gozar y deleitarse con todo lo expuesto en este museo.

Modelo de lo que es un centro comercial, es el denominado "Lloyd Center" de Portland; este lo forman un conjunto de lujosas tiendas, comercios y grandes almacenes en los que prácticamente puede adquirirse de todo; consta de varias calles con tiendas alineadas en tres pisos. Está dotado de un aparcamiento capaz para más de 10.000 automóviles, y todo el conjunto está adornado con parques y jardines que hacen muy agradable el ir de compras a este Centro Comercial en el que el tráfico automovilístico está prohibido.

Por otro lado la ciudad nos mostró su faceta negativa, con los grupos de jóvenes que, conduciendo sus aparatosas motocicletas o sus atronadores bólidos, circulaban hasta altas horas de la noche haciendo alarde de rugientes arrancadas ante los semáforos verdes o de chirriantes frenazos ante los rojos. Ello era causa de que no fuera posible disfrutar del sueño hasta que estos modernos caballos se retiraban a sus cuadras. Lo más chocante era ver como los guardias de la ciudad permanecían impasibles ante semejante estruendo a altas horas de la noche. ¡Cosas de Norteamérica!

*R. Devís*



## NEKROLOGOJ

## JOSE SALADRIGAS ESCOFET

La pasintan 7-an de Septembro forpasis en Badalona, kie li loĝis, nia kara kaj aktiva samideano José Saladrigas Escofet en aĝo de 69 jaroj. Tio signifas gravan perdon por H.E.F.A. kaj por la Hispana Esperanto-Movado.

De sia juneco kiam li esperantistiĝis ĝis la lastaj tagoj de sia vivo, ĉiam li estis en la unuaj vicoj de nia fervojista Esperanto-movado; unue kiel Prezidanto, poste kiel Kasisto kaj lastatempe kiel Vicprezidanto.

Kun sia forpaso malaperas unu el la fondintoj de H.E.F.A., fondita en 1954-a dum la Hispana Esperanto-Kongreso en Zaragoza; ĝin partoprenis la tiamaj estraranoj de I.F.E.F. Sroj. Stapel, De Jong kaj Lok.

Dum sia fervojista laboro kiel lokomotivestro, ĉie li estis tre konata kiel "La Esperantisto" ĉar ĉiam li profitis siajn laborpaŭzojn por instrui Esperanton inter siaj kolegoj.

En 1966 li emeritiĝis; ĝis tiam li ĉiam partoprenis en I.F.E.F. kongresoj kie li havis multnombrajn amikojn pro sia afableco kaj bonkoraj sentoj. Pro tio lia hejmo ĉiam estis nefermita por akcepti esperantistajn gastojn el ĉiuj landoj.

Ripozu en paco nia kara amiko Saladrigas, kaj lia familio ricevu la plej sinceran kondolencon de la granda I.F.E.F. kaj H.E.F.-anaro.

## SANTIAGO ORTEGA BARBERA

Post longa malsano, mortis en Mahón nia altestimata samideano S-ro Santiago Ortega Barberá.

Malnova esperantisto, aktiva membro de H.E.F., li multe laboradis por disvastigi Esperanton, lingvon kaj ideon.

PACAN RIPOZON AL LI!

Por lia familio nian sinceran kondolencon.

---

**Fervojista Sekcio de H. E. F.**

**H. E. F. A.**

I.F.E.F.-KONGRESO EN HISPANUJO

Laŭ informoj ricevitaj, en la pasinta I.F.E.F.-Kongreso, oni akceptis la inviton de Hispana Esperantista Fervojista Asocio (H.E.F.A.) por okazigi I.F.E.F.-Kongreson en Hispanujo, la jaron 1974-an.

La urbo elektita estas Tarragona. Tutcerte niaj fervojistaj samideanoj informos nin pli amplekse pri la evento.

*Okaze de la apero, en la lingvo internacia, de* Cigana Romancaro, *versio de la fama* Romancero Gitano *de Federico García Lorca, la eminenta poeto kaj akademiano hispana Gerardo Diego publikigis en ABC de la 17ª de la pasinta oktobro recenzan artikolon tut-paĝan, kies tekston ni reproduktas ĉi-sube. Konsiderante la tre elstaran pozicion de Gerardo Diego en la hispana poezio kaj en la intelektularo de la lando, la gravon de la ĵurnalo —ABC estas unu el dek plej bonaj ĵurnaloj de la mondo— la favoran recenzon de la aŭtoro kaj ties simpatian sintenon al Esperanto, ni devas saluti la artikolon kiel pozitivan kontribuon al la afero de la internacia lingvo.*

## CIGANA ROMANCARO

"Cigana Romancaro" es, está clarísimo, el "Romancero Gitano". ¿En qué lengua? En una que habría hecho las delicias de Federico de haber tenido tiempo de conocerla. Aunque quién sabe. A lo mejor él era un esperantista consumado. De Lorca pueden esperarse, o esperantarse, todavía hoy, todas las sorpresas. Yo tuve el primer contacto en bloque con esperantistas —hasta aquella mañana radiante de Oviedo tan sólo los había conocido uno a uno— un domingo de hacia 1925 en la calle Uría. Venían de la estación desfilando para ofrecer después un concierto, y venían cantando en esperanto canciones asturianas. El asombro de los ovetenses y, por parte de algunos dados al buen humor, el regocijo, no son para descritos. Al frente de su cortejo venía un militar, creo que a la sazón capitán, que luego había de hacer famoso su nombre en la guerra: Mangada.

Ahora, por mi mala suerte, me he perdido el conocer, aunque confío en que tenga tiempo y lugar pronto un encuentro —por supuesto, pacífico— a un ilustre tocayo, don Fernando de Diego. Vino amablemente, espontáneamente y sin avisar, a mi casa a hora en que yo no estaba. Saludó a mi mujer y me dejó un ejemplar de su 'Cigana Romancaro'. Con antelación me había favorecido con el envío postal de un número de su revista, editada en Zaragoza si no recuerdo mal, porque de momento no sé donde la he metido, también en esperanto. En tal número venía una versión suya de mi soneto "El ciprés de Silos" junto a un poema de Juana de Ibarborou. La traducción era impecable. Fidelísima a lo que pude colegir, porque siempre hay un tanto por ciento de palabras cuyo exacto significado no conozco; sonaba bien y constaba de todos sus versos, rigurosamente endecasílabos y acentuados como es de ley. Y además, rimado con rima consonante. Un primor, y para mí un homenaje inmerecido.

Este nuevo libro viene enriquecido con unas palabras, un 'Antaŭparolo' (también está clarísimo) de William Auld y con una 'Enkonduko' (que ha de ser introducción) del propio traductor, por cierto, muy fina como estudio de los valores poéticos del texto. También en los romances se respeta, en el artificial idioma, la fonética rítmica y la exactitud métrica. Funcionan las asonancias, con lo cual demuestra el esperanto una cualidad que no poseen la mayor parte de las lenguas europeas, los octasílabos son impecables y todo fluye que da gusto.

Confieso que a mí —aparte de mi fe o esperanza, que ha variado según las épocas de mi vida, en su triunfo y posibilidad de arraigo universal— siempre me ha sido muy simpática la empresa de los esperantistas. Y ello se debe a que constituyen una inmensa minoría de agrupación a cara descubierta, y no a cencerros tapados como otras internacionales de las que no quiero acordarme, pero que a mí y a muchos nos causan desasosiego con sus procederes misteriosos. A juzgar por las muestras de estas ardidas versiones poéticas, el esperanto es vehículo propicio al ritmo y a la calidad tan bien imitada del

natural que natural se diría. Véase cómo suena, aunque sea pronunciada por boca profana en fonética esperántica, un fragmento del *Somnambula Romanco,* que no puede quedar más propio:

*Verda, ĝin mi volas verda.*
*Verda vento. Verdaj branĉoj.*
*La ĉevalo sur la monto*
*kaj la ŝipo sur la maro.*
*Kun la ombro ĉe la zono*
*kaj arĝento-frida gapo,*
*verda karno, haroj verdaj,*
*pensas ŝi en la verando.*
*Verda, ĝin mi volas verda.*
*Sub cigana lunoklaro*
*la ĉirkaŭo ŝin observas,*
*sed ŝi vidas nur la vakon.*

★

*Verda, ĝin mi volas verda.*
*Grandaj steloj el gel-grajnoj*
*venas kun la fiŝo ombra*
*en aŭrora avangardo.*
*La fig-arboj frotas venton*
*per la smirgo de la branĉoj,*
*kaj la monto foineca*
*sin hirtigas per agavoj.*
*Kiu venos...? Kaj de kie...?*
*Dume ŝi en la verando,*
*verda karno, haroj verdaj,*
*pensas pri amara maro.*

Gerardo DIEGO
*De la Real Academia Española*

---

Con arreglo al artículo 24 de la vigente Ley de Prensa e Imprenta, ponemos en conocimiento de nuestros lectores que los señores que constituyen los órganos rectores de la revista, **Boletín de la Federación Española de Esperanto,** son los siguientes:

Director: *D. Domingo Martínez Benavente*

Redacción: *D.ª Inés Gastón Burillo*

La revista está financiada por la Federación Española de Esperanto, cuyas cuentas fueron presentadas por el Tesorero de la misma, D. Gerardo Flores Martín, y publicadas en el número de la revista correspondiente a los meses de mayo-junio del corriente año.

---

***Ni Gratulas***

## NOVA INTERNACIA PARO

Ana María Ferrer Hervás, hispanino kaj Janez Zadravec, jugoslavo formas la novan internacian paron.

La geedziĝo okazis la 8-an de novembro, ĉijara, en La Laguna (Tenerife).

Okaze de ĉi tiu geedziĝo, la Esperantista Societo de Tenerife "ESTO" perdas unu el siaj plej aktivaj membroj, kiun tutcerte gajnas la Jugoslava Esperanto-Societo, al kiu apartenas nia samideano.

Koran gratulon al tiu simpatia paro.

# PROMESA Y ESPERANZA

Por *Joaquín Bielsa*

El Esperanto había nacido en mí, como un medio de información muy útil y práctico, que dejando su pronunciada huella experimental, no matizaba ni decía a mi espíritu más que eso, que constantemente oímos. —El que lo sabe. —Es un idioma auxiliar más.

La huella existía y me llevó con un grupo de amigos a un Congreso Nacional de Esperanto, donde quería ver algo más y salir de ese punto muerto en que yo me encontraba. Vigo, como ciudad, tiene por sí misma el suficiente incentivo para aislarle a uno con el embrujo de ciudad de cara al mar, con su industria y unas rías capaces de absorverle a uno. Estábamos pues en el diapasón que podía en cualquier momento medir la potencia exacta de nuestro pensamiento.

Creo que no era el único observador que con los ojos muy abiertos inquería a los congresistas que con sus medallas y lazos verdes, pronunciaban un saludo afectuoso, íntimo y amigo. Sin darme cuenta me mezclaba con ellos, cada minuto, más y más, con personas de distintas provincias que decían no querían más "que conocerse para amarse más" ¿podría ser...?

Todo Congreso nace igual, y a su rito de buen grado nos sometíamos; si bien hemos de reconocer que parecíamos más una autoridad que un congresista, pues como ellos no hacíamos más que preguntar, indagar y sonreir. La única diferencia era que nosotros ya creíamos en algo. El Esperanto era capaz de reunir a unos miles de hombres y mujeres y nos había ayudado a preparar un importante trabajo científico.

Pero solamente su acción material no podía ser capaz de reunir a tantos; ni de hacer interesarse a las autoridades; ni de interesar al turismo y ni mucho menos dar aquellas expresiones de felicidad a todos aquellos hombres y mujeres, mayores y jóvenes. Tenía que haber una filosofía, que yo no conocía...

Fueron presentados todos los grupos de las distintas provincias, sin más matiz que el estrictamente humano. Ferroviarios, invidentes, agrupaciones juveniles, juntas rectoras, con un mismo índice común, unirse para ser conocidos y que con el conocimiento nazca la flor de la compresión, la amistad, el cariño y la paz.

Toda esta filosofía parecía una tramoya muy bien preparada, pero creo que la mayoría de los observadores esperábamos, la figura que diera vida a todo aquello. Algo tenía que haber que nos explicase el por qué habíamos ido a ver el lucir de las anclas de los "Galeones de Rande", el espíritu de Zamenhof o el decreto de un gobierno del mundo que de una vez para siempre explicara a los hombres que ya se había gastado suficiente dinero para no entenderse, y que con la caída de la Babel había nacido la Esperanza... Pero nada de eso había sucedido. Empezábamos a creer era una vivencia más de las muchas ya pasadas y que no saldríamos de la duda con la que habíamos iniciado nuestro periplo...

De pronto se hizo un silencio expectante. Subía hacia la tribuna una señora mayor. Lentamente, con sencillez y dignidad, no exenta de una manifiesta emoción que la transformó una vez que se colocó de cara a la Asamblea. Se hizo más profundo aún, si cabe, el silencio. Y con voz llana, equilibrada y con marcado timbre femenino dijo:

Soy la última esperantista y la menos indicada para tomar la palabra en esta Asamblea. Pero tengo también que manifestar mi mensaje.

Hace más de doce años yo conocí estas tierras con mi esposo que quería recordar su tierra de nacimiento, fundirse en su galaico país y visitar su familia. Visita eterna pues en pleno Congreso nos dejó a todos. De todos ustedes yo recibí entonces todo el calor y arropamiento necesario para no desmoronarme de aquel golpe y continuar mi vida con vuestra tutela en una querida provincia española.

Desde entonces yo tenía una promesa que cumplir: Conocer el Esperanto y volver a vuestras tierras como esperantista, con este mi sencillo Esperanto he cumplido mi promesa... a todos quiero daros las gracias y quiero deciros que vengo aquí con la fuerza de mi humildad y con el esfuerzo que durante tanto tiempo he tenido que derrochar para dominar vuestra lengua, hoy la mía.

# HISPANA LIRIKO

LEON FELIPE CAMINO naskiĝis en Tábara (Zamora) la 11-an de aprilo de 1884 kaj mortis en Meksikio en 1968.

Lia poezio estas skua vento, voĉo pasia, tondro laŭ la maniero de Whitmann kaj de la bibliaj profetoj. Kun la elano de sovaĝa taŭro li impetas kontraŭ la teroro kaj la maljusto de la katastrofaj jaroj, kiuj de 1936 ĝis 1945 konsumiĝis en la hekatombo de civilaj kaj internaciaj militoj.

Senĉesa vojaĝanto, ĉefe tra Ameriko, li verkis tie, kiel engaĝiĝinta poeto, grandan parton de sia verko. En sia suba poemo, tre konata en la tuta hispanlingva mondo, li plastike esprimas la sopiron de sia koro al vagado.

## *TRA LA VIVO PILGRIMADI*

Tra la vivo pilgrimadi
ĉiam al malsamaj teroj,
sur diversaj vojo-strekoj.
Tra la vivo pilgrimadi
sen ofico
kaj sen nomo
kaj sen hejmo.
Tra la vivo pilgrimadi
sen direkto.
Nek al koro
nek al menso
faru kalojn
la aferoj.
Ĉiun lokon preterpasi
unu fojon
kaj rapide,
tre rapide,
kun ĉiama rapideco.

Ne kutimu la piedo
paŝi sur la sama herbo,
sur tabuloj
de la sceno
aŭ sur slaboj
de la templo,
por ke ni sakristiane
ne murmuru
nian preĝon,
nek ni diru old-aktore
nian verson.
La neniofara mano
havas fajnan
tuŝosenson,
diris Hamlet, ĉar li vidis,
kiel, en la sama tempo,
la tombisto fosis, kantis
ĉe la ĉerko.

Ne sciante la metion,
ni laboros
kun respekto.
Por mortinton enterigi
laŭ la deco,
ĉiu taŭgas, se escepti
la fosiston de tombejo.
Iam ĉiu el ni scias
distribui
la justecon.
Kiel la hebrea reĝo
justis la ŝildisto Sancho
kaj l' agrulo Pedro Crespo.

Nek al koro
nek al menso
faru kalojn
la aferoj.
Ĉiun lokon preterpasi
unu fojon
kaj rapide,
tre rapide,
kun ĉiama rapideco.

Sub diversaj
firmamentoj
kaj sentante
ĉiun venton,
ne prikantu ni, poetoj,
floron de nur unu bedo,
aŭ la saman
vilaĝeton.
Ĉiuj bedoj
kaj vilaĝoj
estu niaj
en sinsekvo.

Traduko:
*F. de Diego*

---

Pero todo mi esfuerzo nada vale con la compensación de haber conocido tantos amigos, haber ayudado a tantos "samideanos" y por encima de todo la emoción de este momento, que durante muchas horas me ha quitado el sueño en mi insignificancia pero ha sido a la vez la razón de mi vida y ahora sin yo misma quererlo ni pensarlo me siento mucho más grande...

La gran ovación que cerró sus últimas palabras, fue el aldabonazo final que creo abrió otra puerta a una nueva filosofía. Una **nueva esperanza había** nacido... ¡Gracias, Agustina!

*La alta tajdo de la Esperantaj periodaĵoj minacas inundi mian skribotablon. Revuoj kaj revuetoj de ĉiuj formatoj kaj tendencoj intermiksiĝas pace. Ho, se nur tiel povus intermiksiĝi la homoj ilin skribantaj kaj legantaj! Eĉ se multaj periodaĵoj estas skeletaj, anemiaj, apenaŭ du tri folietoj kunkudritaj per agrafo, la konfronto de tiel diversaj voĉoj kaj opinioj montras, ke Esperanto vivas en ĉiuj kampoj de la homa penso kaj posedas ankoraŭ sian denaskan magion allogi kaj reteni la entuziasmon, la fervoron kaj la ĝismortan fidelon de tre multaj homoj tra la mondo. Esperanto estas ne nur lingvo kun vole-nevole ideologia fono sed unika fenomeno en la historio de la monda kulturo. Ke ni, esperantistoj, troviĝas protagoniste meze de tiu fenomeno, devus stimuli en ni senton de ĝusta fiero kaj de ankoraŭ pli granda sindediĉo al la idealo de la lingvo internacia.*

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, n.° 109 (189), aŭgusto 1972, traktas pri 'problemo', sen scii, ke jam de kelkaj jaroj ĝi estas solvita.

"Bela? Beleta? Oni povus konsideri, ke la koncepto "bela virino" bildigas antaŭ la mensaj okuloj figuron de kombinitaj majesteco, gracieco kaj ia strange imponanta supereco, kio mankas al 'beleta' knabino aŭ virino. Ĉi tiun ofte karakterizas petolemo, koketeco, kiuj ne facile kongruas kun la marmoreca perfekteco de la unua tipo. Laŭ Plena Vortaro: 'beleta: iom bela; pli plaĉa ol konforma al la reguloj de la beleco.' Bona difino, sed ankoraŭ ni disponas nur la formon 'beleta', per kiu ni devas traduki la riĉon de nacilingvaj sinonimoj aŭ aspektoj pri-personaj. En nederlanda poŝvortaro 'beleta' sola servas por vesti ses nuancvortojn! Konsiderindaj estas: pupeĉarma, plaĉa-aspekta, okulplaĉa, okulloga, aminda, ĉarmeta, dolĉ-persona, plaĉ-vizaĝa, plaĉ-figura... La glosaro de 'Parnasa Gvidlibro' ne helpas solvi la problemon, sed eventuale iu poeto ekuzos neologismon 'minjona' (Fr. mignon) trovatan en Wester kaj Wingen (vortaroj)."

Ŝajnas, ke la simpatiaj amikoj de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST ne bone trarigardis la glosaron de 'Parnasa Gvidlibro', ĉar en la paĝo 156 troviĝas *linda* - beleta. *Linda,* belsona kaj mallonga vorto, ege bonvena do inter poetoj, havas sian originon ĉe la samsignifa kaj samforma vorto hispana. Cetere, *linda* sidas ankaŭ en PIV kaj estas jam uzata en nia literaturo, ekzemple, en la Kalocsajaj tradukoj de 'La Tempesto' kaj 'Somermeznokta Sonĝo'.

En HUNGARA ESPERANTISTO, septembro 1972, s-ro Ludoviko Korsos diras saĝajn vortojn, kiujn devus atenti ĉiuj esperantistoj kun gvidaj funkcioj sur internaciaj, naciaj kaj lokaj niveloj: "Kiel la plendoj de la malsanulo kontribuas al la ĝusta diagnozo de la kuracisto, ankaŭ ni akceptu la diversajn plendojn, estu tiuj lokaj aŭ privataj. Homoj faras la movadon, do ni devas ekkoni la plendojn privatajn, eĉ se ili ŝajnas en la komenco bagateloj, por ke ni povu ekkoni la mankojn en sia tuteco, ĉar sen ĝusta diagnozo ne estas plena resaniĝo ĉe la paciento."

Celite, trafite! Sub la rubriko "Parolas la leganto" de HEROLDO DE ESPERANTO, 1 oktobro 1972, s-ro L. Molnar skribas: "Ne, niajn vicojn oni ne forlasas pro la tro altnivelaj verkoj, pro la neologismoj. Ja ĉiuj trovas verkojn laŭ sia gusto kaj klereco. Neniu forlasas la anglan lingvon pro la Ŝekspira lingvaĵo. Laŭ mia opinio la movadon forlasas tiuj, kiuj opiniis la lingvon tiel facila, ke ĝin oni povas uzi sen serioza lernado, aŭ tiuj, kiuj esperis pli rapidan venkon por ĝi, aŭ tiuj, kiuj esperis profiti el ĝi kaj ne sukcesis."

Tre interesa estas la poparte aperanta vortaro de germanismoj, kun ties traduko en Esperanto, de DER ESPERANTIST, revuo de La Amikoj de Esperanto de la Demokratia Germana Respubliko. La vortaro, konscience kaj zorge farita de Curt Kessler, estas utila ankaŭ al ĉiuj esperantistoj, eĉ se ili ne konas la germanan lingvon, pro la abundo de ekvivalentoj Esperantaj, kiuj riĉigas nian internacian frazeologion. Kessler sciis metode kaj inteligente fruktuzi la enhavon de 'Esperanta Proverbaro' de Zamenhof, sed aparte li donas grandan kvanton da originalaj, internaciece konstruitaj parolturnoj. Bela ekzemplo de serioza kaj pozitiva laboro! Ĉu iam ni vidos libroforme ĉi tiun gravan vortaron?

S-roj Ernesto Sonnenfeld kaj E. Rodríguez Ontoria trafe rebatas en **OOMOTO INTERNACIA**, majo-junio 1972, la opiniojn de D-ro Halbedl, kies artikolo 'For la Ĥaoson!' aperinta siatempe en diversaj Esperantaj organoj, esprimas ankoraŭfoje la jam eluzitajn kaj tedajn argumentojn kontraŭ la 'neologismoj' kaj kontraŭ la riĉiĝo de la vortoprovizo de la lingvo. Diras Rodríguez Ontoria:
"Kial ne uzi tiujn vortojn jam konatajn kaj signifoplenajn, anstataŭ krei pli longajn, kelkfoje iom kapricajn kaj multfoje kreitajn de memkontentiĝaj vortoĵonglistoj? Ĉu la vorto 'trajno' ne estas pli ĝusta, pli oportuna kaj internacia ol la vorto 'vagonaro' al kiu, plie, mankas la lokomotivo? Kaj la uzado de tiuj vortoj neniel malutilos aŭ 'ĥaosigos' la lingvon, nek kontraŭstaros la penson de D-ro Zamenhof, ĉar se li, tute prave, insistis pri la netuŝebleco de la Fundamento, li ankaŭ diris: 'Ĉiun bonan esprimon, kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta havas plenan rajton aligi al si.' Kompreneble, kalkulante kun la saĝo kaj konstanta kontrolo fare de la Akademio."
Ĉu D-ro Halbedl ne opinias, ke eĉ la fundamenta vortaro estas ŝoke riĉa, kaj ke multaj vortoj superfluas en ĝi? Mi sugestas, ke de nun li kaj liaj geamikoj uzu interalie la elegantajn *maltago, maljes, maliri, malprozisto, malnaski, malkomenci, malkuŝi, malkurba,* ktp., ktp., anstataŭ la tute nenecesaj duoblaĵoj *nokto, ne, halti, poeto, mortigi, fini, stari, rekta,* ktp., ktp.

El LA MIGRANTO, n.° 53, 1972 (3), oficiala ligilo de la esperantistoj naturamikoj: "La sola verdo en Roterdamo estas la trafiklumoj". Ĉu nur en Roterdamo?

La vivo estas plena de sangaj kaj ironiaj misefikoj, kaj eĉ farante sincere bonon, oni kelkfoje kaŭzas nevole malbonon. Legu la jenan alineon de Reg. C. W. Bedford en DIA REGNO, n.° 9, septembro 1972:
"Kompreneble, ni, kristanoj, ĉiam estas pretaj helpi la mizerulojn tra la mondo. Ni rajtas fieri pri la aro de help-organizaĵoj de ĉiuj eklezioj. Eĉ ni en nia Esperanta movado havas niajn okulklinikojn, kiuj laboras en Afriko. Sed, kaj oni devus literumi la vorton en majuskloj SED, ĉu ni bone faras? Ĉu ni agas saĝe? Kial nia helpo ne sukcesas, sed starigas pli da problemoj? En kelkaj landoj ni bone sukcesas savi tiujn infanojn, kiuj mortus en antaŭaj tagoj, kaj ni etendas la vivodaŭron de plenaĝuloj —kaj la rezulto estas pli da malsato. Ni konstruas industriajn fabrikojn —kaj la rezulto estas malpureco de la aero kaj la riveroj, kaj strange, senlaboreco, ĉar ni allogas tro da junuloj al la industria vivo kaj ili ne povas reveni al la vilaĝa viv-maniero post industria edukado."
Eble ni alproksimiĝus al la solvo, se ni konscius, ke la nura karitato estas apenaŭ paliativo, kaj ke, krome, necesas la starigo de pli justa kaj humana socio-ordo en oriento, en okcidento, en nordo kaj en sudo.

Denove ni trovas la pesimisman-optimisman sintenon rilate al Esperanto, ĉi-foje en STARTO, organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, n.° 5, 1972:
"Ĉu Esperanto progresas, demandas ofte ne nur skeptikuloj, sed ankaŭ adeptoj el la 'propra' rondo, kiuj ne trovis en si mem sufiĉan fervoron por la afero... Kaj ili, la dubemuloj kaj malaktivuloj, fariĝas pli granda bremso de la movado ol malpravaj kritikantoj de ekstere. Esperanto havas ankaŭ hodiaŭ multegajn kontraŭulojn. Sed nur idealismaj naivuloj povus deziri senkonfliktan evoluon de iu ajn ideo aŭ movado, ne havante emon kaj forton por kontraŭargumentadi. Se ni rerigardas la lastajn du tri jardekojn, Esperanto certe progresis kaj konstante progresas laŭ sia aplikado kaj rolo en la socia vivo. Tiu ĉi rolo estos des pli efika, ju pli la esperantistoj klopodos pliaktiviĝi."
Kvankam Esperanto finfine pruviĝus nur neatingebla revo, ĉu ekzistas tamen io pli bela ol esti sub la sorĉo de revo? Sed la samon diris belege Kalocsay:

*Ho, jen vi, Esperanto! Ne glora kaj fiera,*
*nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,*
*svenema kaj senhelpa kaj —eble— senespera,*
*sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.*

Kaj nun, karaj geamikoj, feliĉan novan jaron kaj ĝis la proksima rikolto vintra.

*F. de Diego*

# EŬROPISMO



Nia s-ano Pedro Nuez prelegas en Vigo

En la gazetaro, konstante aperas polemikaj artikoloj rilate la eŭropan merkaton; ŝtatestroj kaj unuaj ministroj kunvenas por establi aliancojn; influantaj kompanioj postulas la pligrandigon de partoprenantaj landoj en eŭropaj traktatoj; elstaraj ekonomikistoj diskutas pri doganoj kaj la verda Eŭropo (tio estas, pri la interŝanĝo de agrikulturaj varoj); ĉiutage, iĝas novaj kontaktoj, periodaj kunsidoj, favoraj opinioj...

Ni, ĉiuj, konstatas, ke ekzistas reala emo, inklino, direkto al tia bonvolemo por starigi tutkontinentan pacon, por disvastigi eŭropan komunan kulturon, por formi veran eŭropan unuiĝon. Ŝajnas, ke tiu idealismo estas moderna, ke ĝi kreiĝis nuntempe.

Tamen, la koncepto pri la eŭropa ideo, konata ankaŭ kiel eŭropismo, estas tiel antikva kiel la historio mem.

Ni analizu la ĉefajn trajtojn de tiu historia stadio; kompreneble, skize, resume, ĉar estas neeble dum la daŭro de prelego, detale pritrakti 3 mil jarojn da eventoj.

Filozofo diris, ke nenio estas nova sub la suno. Kaj prave li diris; ĉar la ideo pri eŭropismo, ke Eŭropo iĝu unu tuto unueca, ripetiĝas de unu jarcento al la alia, dum pli ol tri jarmiloj.

La Eŭropo-ideo, neniam estis kolektiva deziro aŭ pensmaniero, sed nur sento de kelkaj izolitaj konsciaj eŭropanoj, verko de avangardaj progresemaj revuloj. Tiu ideo, ne fariĝis tagon post tago, sed naskiĝis spontane, de tempo al tempo, en malsimilaj cirkonstancoj, en malsamaj medioj, en diversaj lokoj kaj epokoj.

Eŭropo, en la vera senco de la vorto, ne estas geografia kontinento, ĉar ĝin ne limigas naturaj limoj; ĝia strukturo kaj dimensio ne havas konkretan nek difinitan konturon; la landolimo kun Azio estas arbitra: nek rivero nek ĉeno da montoj apartigas la du vastajn regionojn. La ekziston de Eŭropo konfirmas ĝia palpebla korpo kaj spirito, fiksas ĝia loĝantaro kun sia diverskolora civilizacio, firmigas ĝia universalisma kulturo.

La origino de la nomo de nia malnova kontinento, perdiĝas en la nokto de la tempo. Historiistoj kaj filologoj, traserĉis, konjektis, eĉ la saĝuloj de la antikveco jam priokupiĝis pri tio. Hesiodo, greka poeto, kiu vivis je la 8-a jarcento antaŭ Kristo, ja en la versoj de sia verko "Teogonio", citas la nomon "Eŭropo". Eŭropo estas la nomo de unu el la 3.000 mitologiaj oceanulinoj, nimfo de la maro, filino de la oceano. Unuj atribuas la nomon al hebrea lingvo de la biblia tempo: "oreb", tio signifas "vespero"; aliaj, al Sofoklo kaj Euripido, kiuj nomas "opia" la teron; triaj, la kunmetitan vorton "eurus" (vasta) kaj "ops" (okulo), tio estas, "vidi malproksimen". Do, ni povas konstati, ke la etimologio, firme, nenion klarigas.

La eŭropan spiritan karakteron, kreis tri malsamaj civilizacioj: la greka, oferante la arton, la kulturon, la filozofion; la romana, disponigante la retorikon, la arkitekturon, la juron; kaj la kristana, disvastigante konceptojn pri

universalismo.

La eŭropan popolon, formas bukedo da kontrastoj: ekde la blondaj norduloj, bluokulaj, hele haŭtaj, fortikaj, silentemaj, ĝis la mediteraneaj loĝantaroj, brunaj, nigreharaj, kortuŝemaj, parolemaj. Kaj la grunda fizionomio: vastaj stepoj, altaj montoj, fekundaj valoj, lagoj, senfinaj marbordoj...

La estiĝo de Eŭropo fariĝas dum 20 jarcentoj. La sperto, la tradicio, la naciismo, la individuismo, la internaciismo kaj universalismo estas la diversaj etapoj, kiujn trairis la malnova eŭropa raso. Grekujo estis la semo, la ĝermo, kaj Romio la sterkita grundo. La romian vastecon, limis la riveroj Rejno kaj Danubo. Malantaŭ ĉi tiu natura barilo, estis "la ignorata tero", "la nekonata regiono". La romia imperio konsistis en la mediteranea baseno, Gallio, Germanio kaj Britio. Do, tio estis la tuta malnova okcidenta mondo. Dum jarcentoj, eĉ dum la mezepoko, tiu teritorio donis ne nur la silueton sed ankaŭ sian kulturon, la leĝaron, la lingvon, la progreson, unuvorte, la ostaron kaj karnon de la nuna Eŭropo.

La romia imperialismo, kiel iu ajn absolutismo, estis bazita sur militforto, subpremante la venkitajn popolojn. Estas stadio de centralizo kaj krueleco. Prudon, en sia verko "Cezarismo kaj Kristanismo", skribas: "la Pax Romana, estis la malgaja paco de la tomboj". La romanoj estris la popolon por sia propra profito, malakceptante la leĝon kaj kontrakton. Ĉiu subpremata civitano estis kvazaŭ fremdulo, samsignifa kiel malamiko, sklavo. Eta preteksto estis motivo por apliki leĝan punon.

Dum la daŭro de 2.000 jaroj, aperas ambiciaj individuoj, vantaj kaj egoismaj, gloramaj, kiuj revas posedi la unuiĝon de Eŭropo en siaj manoj; unueco, ne en la senco de universalismo, sed kiel regno, perforte militakirita, subpremante la liberecon homan, malpermesante la naturan rajton de la homoj. La plej konataj, bedaŭrinde, el tiaj individuoj estas jenaj:

Julio Cezaro, romana diktatoro, militisto. Estas lia, la fama frazo: veni, vidi, venki. Li atribuis eĉ sian devenon el Eneo, filo de Ankizo kaj Venera, geprincoj de Trojo.

Aŭgusto, pranevo de Cezaro, konata ankaŭ kiel Oktavio. Li starigis regimentojn da ŝtataj funkciuloj, censigis la loĝantaron por establi pliajn impostojn, pligrandigis la centralizon. Je lia morto, oni honoris lin, kvazaŭ Dion.

Karolo la Granda, reĝo de Francio kaj absoluta okcidenta imperiestro.

Frederiko la unua, germana imperiestro, alnomita Barberusco. Li detruis komplete Milanon.

Karlo la V-a, reĝo de Hispanio kaj imperiestro de Germanio, absoluta posedanto de Flandrujo, Aŭstrio, Germanio kaj Hispanio kun amerikaj kolonioj. Ege ambicia, li pretendis universalan monarkion.

Napoleono Bonaparto, militisto, despoto, malhumila en tia grado, ke li eĉ sin kronis imperiestro. Li, ruze, firmigis la eklezion al ŝtato, tiel, ĉiam li havis ĝin obeema.

Kaj lastatempe, Adolfo Hitlero, la plej malglora, la sangavida faŝisto, kiu kuntrenis la mondon al detruiĝo. Fanatika kaj freneza diktatoro, kiu pereigis milionojn da homoj, ruinigis naciojn, disigis familiojn.

Ni esperas, ke post la tempo, la homaro iĝos pli saĝa, kaj ni devas elkore deziregi, ke tiajn ulojn neniu patrino nasku.

Feliĉe, apud tiuj malindaj homoj, ŝprucas aliaj, kiuj estas sentemaj, grandanime amas la homaron, luktas kaj sin oferas al la popolo. Ili havas progresemajn spiritojn. Ili estas profetoj de la homa justeco, antaŭvidantoj de paca kaj harmonia mondo.

Kronologie, unue elstaras Zenono, greka filozofo, naskiĝinta je la jaro 490 a.K. Li diris, "ke la homo ne estas loĝanto de loko aŭ urbo, apartigitaj unuj de aliaj per drastaj leĝoj, sed ni estas civitanoj apartenantaj al unu sama homaro, al unu sama mondo".

Marko-Aŭrelio, la plej virta el romiaj imperiestroj, famkonata pro sia stoika saĝo, modera, pasiema al filozofio kaj beliteraturo, li verkis "la homo devas akcepti la mondon kiel komunan ejon por la homa gento; la socio, estas la konstruo, kiu staras danke al tiuj".

Iom post iom, la pagana religio, la politeismo, transformiĝas, adaptante sin al la pli kaj pli puŝanta nova doktrino, ja akceptita de granda parto de la popolo. Mastro absoluta de la diismo, la papismo influas landajn regantojn; movas la fadenojn de la politiko; kreas mondan tradicion; starigas fortikajn

ligilojn kun reĝoj kaj imperiestroj; la tuta okcidento estas kovrita de nevidebla reto kun unu sola eklezia ĉefo. La primitiva kristanismo, la popola, la persekutita, la simpla sed samtempe altruisma, ne plu ekzistas.

Dume, la romia imperio dismembriĝas; la maŭroj invadas grandajn teritoriojn, multe pli vastaj ol la romanaj; naskiĝas kaj malaperas nova imperio, tiu de Karolo la Granda, malsama ol la Romia, sen lingva unueco, sen sekvo de pasinta tradicio, okupanta ĝermanajn kaj latinidajn regionojn; la ĉefurbo situas en Aikso la Provenca, akso de okcidento, tamen, teorie, simbole, alifoje estas Romo, la eterna, Romo, la malfacile konkerebla, ĉar tie staras la liturgia imperio, la eklezia trono.

Nova politika sistemo establiĝis: la feŭdismo. Tia reĝimo, pli kaj pli fariĝis intensa. La terposedantoj, iom post iom, iĝis la absolutaj mastrosinjoroj, kiuj posedis ne nur la bienojn sed ankaŭ la kamparanojn; la terkulturistoj vivis en sklaveca stato, nehavantaj la rajton transmigri, sen konsento, el la bieno, kaj je la vendoprezo aŭ hereda transakcio, ili estis transdonitaj kune kun la farmodomo. Alifoje, la piramida sistemo firmiĝas: kiel bazo, estis la vasaloj, poste la feŭdosinjoroj, dependantaj de la reĝoj, super tiuj ĉi, la imperiestro, kaj ĉe la pinto de la piramido, la Papo, kiu estris la mondan monarkion.

La malkovro de Ameriko, estas nova ŝtupo al progreso: la papismo stumblas, ĉar konvinkitaj ke la Okcidento estas la centro de la universo, kaj ke Adamo kaj Eva estas niaj pragepatroj, do, ĉu la indianoj ne estas verko de Dio? Kiu kreis ilin? Jen demandoj, kiuj malvalorigis la tiamajn teologiajn kredojn. La vojaĝo de Marko Polo tra Ĉinio, je la komenco de la XIV-a jarcento, ŝanĝas la geografiajn konceptojn.

La scienco ekfloras. La ideo pri Eŭropismo ja ĝermas. Petro Dubois, instruita homo, eksstudento de la universitato de Parizo, racionalisto, apartigas filozofion el la teologio. En lia verko "Traktato pri ĝenerala politiko", enhavas inteligentan planon pri eŭropa federacio. Li estis vera pioniro de la modernaj ideoj: postulis la eklezian reformon; la konfiskon de la ekleziaj bienoj; la geedziĝon de pastroj kaj monaĥoj; la virinan rajton al lernado, starigonte specialajn liceojn (ni devas rimarkigi, ke ĝis la jaro 1860, estis konsiderata malmorala, la instruado de Naturscienco al junulinoj). Tiu avanculo, kompreneble, estis ekskomunikita de la Papo.

La grava okcidenta skismo, en la jaro 1378, signas la papan dekadencon. Komenciĝas modernisma laika movado ĉe la literaturo, arto kaj scienco. La Renesanco kunportas la limdifinon de nacioj, kaj starigas la konstantan impostadon ŝtatan.

La konkero de Konstantinopolo fare de Mahometo la II-a, estigas, kiel reago, la eŭropan spiriton.

Antonio Marini, fuĝanta en Bohemlandon, proponas, al tiea reĝo, aŭdacan projekton: emancipi la popolon kaj la reĝojn el la imperiestro kaj Papo, formante la Novan Eŭropon.

En la nacioj, regas la absolutismo: interne, la despotismo; ekstere, la imperialismo kun avida posedo de sklavaj kolonioj.

La tradicio de 15 jarcentoj, komenciĝas fendiĝi pro la pezo de intelekta revolucio. La homa racio anstataŭas la religian superstiĉon. Ĉu ni devas rezigni la ideon pri universalismo? sin demandas kelkaj eŭropanoj. La laika Eŭropo jam forĝas la kosmopolitismon, la homaranismon. Oni deziras starigi aliformitan kristanismon, nek la primitivan romanan, nek la helenan paganismon. Novaj ideoj antataŭas hipotezojn, la scienco, la negativan tradicion.

Du gravaj teknikaj inventoj, la presarto kaj la papero, rapidigas la disvastiĝon de la kulturo, de revoluciaj ideoj, de avangardaj konceptoj. Ĝis tiam, la scio restis en la bibliotekoj de monaĥejoj, ekde tiam, la popolo posedis socian progresigilon.

Francisko Bacon kreas la eksperimentan metodon. Erasmo, nederlanda saĝulo, literaturisto kaj filozofo, estigas la fundamenton de la leĝaro.

Homoj pasiaj je oro, plezuro kaj konkerambicio, per velŝipoj sulkas la oceanojn. La strukturoj ŝanĝiĝas; oni akiras novan konscion.

La hispanoj Francisko Vitoria kaj Baltazaro de Ayala kune kun la italo Alberiko Gentilis, fondas la publikan internacian juron. "La homa raso, kvankam dividitaj en popolojn —ili diras— posedas ne nur specifan unuecon, sed ankaŭ moralan unuecon, kiun ni malkovras el la naturaj reguloj pri amo kaj reciproka harmonio". Tiuj, perceptas, ke milito ja ne estas necesa por solvi

teritoriajn diskutojn. Pere de la diplomatio kaj kompreno, la homo povas atingi la pravon kaj justecon. Tiajn postulojn universalajn, proklamas la fama nederlanda juristo, Hugo Van Groot, kiu proponas Societon de Nacioj, sin bazanta sur naturaj leĝoj. En Parizo, ekzilita, li verkas pri kompleta monda paco kaj tute libera komerco; ankaŭ li konsentas, ke la milito estas absurdaĵo.

Sulio, pastra konsilanto de Henriko la IV-a, projektas respublikan asocion eŭropan, konsistanta el 15 ŝtatoj, kaj oni devas toleri tri oficialajn religiojn. Tiun Unuiĝon regos sesdekmembra konsilantaro, kiu arbitracios disputojn.

La kardinalo Richelieu, je la krepusko de sia vivo, diktis teatraĵan temon, eltirita el sia fantazio, titolita "Eŭropo", kion prezentis al la publiko la 18-an de novembro de 1642. La teksto enhavas la restariĝon de eŭropa paco danke al l' ekvilibro kaj harmonio internaciaj.

L' angla kvakero Penno, leĝisto, publikis verkon, proponanta eŭropan parlamenton, konsistanta entute el 90 delegitoj, laŭ nacia graveco ĉu loĝantara ĉu ekonomia. La prezidanto de tiu parlamento estiĝos laŭvice. La decidojn oni formulos per balotado. La lingvoj uzotaj: la latina kaj franca.

Johano Luko, deziras "civilan eŭropan registaron", inspirita el angla politiko. Bellers, defendas la tezon por "Unuiĝintaj Ŝtatoj eŭropaj". Sciate estas, ke la juna Ameriko, akceptas tiajn ideojn adoptante ilin.

Abunda aro da intelektuloj postulas la samon: Kartezio, Bajlo, Spinozo, Fenelono, Paskalo, kaj ceteraj. La pasio al unueco, igas Lejbnicon lukti favore al universala monarkio.

Alia koloso de la eŭropismo, estis la abato Sankta Petro, kiu, en la babela Eŭropo, ŝprucigas pacan projekton, iom konservativan. Lian ampleksan verkon (20 volumoj), oni povas resumi jene: ĉiama regnestra alianco; nepra obeo al la eŭropa senato; ŝtata kontribuo al la elspezoj de la senato, kaj, kolektiva sindefendo.

Post la "abata bonulo", troviĝas Rousseau, aŭtoro de "La sociala kontrakto". Li, post finlegado de la verkoj kaj privataj dokumentoj de la mortinta abato, eldonigas 40-paĝan broŝuron, kun liaj pensoj. Rousseau estas aktiva partiano de eŭropa konfederacio, bazita sur la komuna bonfaro. Liaj ribelaj ideoj estas pli profundaj ol tiuj de la abato.

La kleruloj Monteskio kaj Voltero kontribuas al eŭropismo. Ili perceptas eliton da inteligentuloj, kiuj estros la eŭropajn civitanojn, kiuj vivos feliĉaj en kontinento sen malamo, sen ambicio, sen milito.

La franca Revolucio markas, en la homa historio, startan mejloŝtonon. Ido de antaŭaj utopiaj pensoj, la Revolucio franca metas en praktiko la principojn liberalajn. Tiuj revolucianoj reprezentas la racian individuismon. Ili pretendas anstataŭigi arbitran sistemon per sistemo bazita sur racio kaj sperto. La universalismo kaj la demokratio estas la standardoj de la revolucio. Tia nova situacio, donos generan progreson, kaj antaŭvidas kompletan eŭropan forpelon de la tiraneco, kaj tiam, la popoloj, sen malbonoj, fratiĝos en paca libereco: Mirabeau, La Fayyette, Robespiero, kaj aliaj, elokvente tion asertas. La revolucianoj estas konvinkitaj, ke en la nova reĝimo, la paco estos natura stato. La reĝa despotismo, laŭte kritikata, denove aperas en la nova Respubliko, sed nune, en formo de teroro.

Post la Revolucio, Napoleono, kiu, laŭ siaj propraj vortoj, reprezentas "la filozofion de la sabro". Kelkaj biografoj taksis lin honesta kaj sincera.

La filozofo Emanuelo Kantio, asertas ke la juro estas la vera korpo de la homa spirito. La problemo, laŭ li, estas establi, inter la nacioj, jurajn regulojn, tiel, de la anarkiismo, la homaro migros en la civilizacion. Kantio insistas, ke la komunumo ne estas objekto, sed sociologia realeco, fakto.

Dum la XX-a jarcento, la plej diversaj politikaj sistemoj trafas Eŭropon; ekde monarkio ĝis demokratio, ekde faŝismo ĝis komunismo. Estas tajdo de internaciismo kaj sindikatismo.

Inter du periodoj de konkreta progreso, du sangplenaj militoj detruas Eŭropon, kaj idealoj pereas. Estas epoko de malsato, de morto, de malriĉeco.

Saĝuloj asertas, ke dank' al l' atombombo, ne plu estos militoj en nia mondo; sed ankaŭ alilandaj sciencistoj eltrovas la formulon pri la fusio de la atomo. Timoj kaj minacoj starigas la pacon, la relativan pacon! Post kruela milito, ŝprucas la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu, verŝajne, solvos ĉiujn mondajn problemojn.

Denove konferencoj, kunvenoj, aliancoj. La ideo pri Eŭropo firmiĝas kaj

entuziasme kreskas. La eŭropa movado startas. La eŭropa merkato estas preskaŭ realeco. Tiu revo ne plu estas fantazio.

Tamen, ni ne estu naivaj. Se ni profunde analizas la realon, ni tuj konstatas, ke ĉio estas nur bonvolemo. Vere, ni estas preskaŭ ĉe la sama mejloŝtono kiel niaj antaŭuloj.

Antaŭ ol konstrui la Eŭropan Unuiĝon, nepre ni devas starigi fortikan fundamenton.

La unua grava problemo eŭropa estas la Babelismo. Sen komuna lingvo, sen neŭtrala lingva instrumento, kiu faciligu la interŝanĝon de pensoj kaj sentoj, la eŭropanoj estas kvazaŭ fremduloj en Eŭropo. Neniu nacia lingvo povas roli kiel eŭropa komunikilo. Nur Esperanto, la milfoje laŭdata Esperanto, estas la unika lingvo kiu kapablas doni al la eŭropanoj la efikan rimedon kaj instigilon por vera kaj konscia Eŭropismo.

Neniam la homoj akordiĝos pri elekto de nacia lingvo, ĉar ĉiu konscia civitano, komprenas, ke nacia lingvo uzata kiel internacia, fariĝas imperialisma lingvo, kaj lingva imperialismo alportas la sklavecon de kulturoj kaj privilegion en la komerco kaj en la politiko; kaj tio estas tute ne akceptebla nek tolerenda en vera demokrata Eŭropa Unuiĝo.

Post la solvo de la Babelismo, ni devas senarmigi armeojn, detrui monopolojn, forpeli kastajn privilegiojn, ĝisfunde elradikigi rasajn, religiajn kaj klasajn antaŭjuĝojn, forigi la absurdajn landolimojn, nepre establi la justan distribuon de la produktaĵoj; malcentralizi ŝtatojn, akceli la internacian komercon sen intervenoj de registaroj nek artefaritaj baroj, aboli intrigajn politikajn partiojn, ke ĉiu rajtu je eduko kaj kulturo, ĉar ni, la homoj, nur bezonas justecon kaj liberecon. Kaj pere de tiuj du rajtoj, justeco kaj libereco, ni atingos la feliĉon, la fratecan harmonion, la mondan pacon kaj amon.

---

## INTERNACIAJ PASTRAJ KUNSIDOJ

Dum la 26ª-27ª kaj 28ª de septembro ĉijara, okazis en Zaragoza Internaciaj Pastraj Kunsidoj. Partoprenis ilin ĉirkaŭ 2.000 pastroj el diversaj landoj.

La ĉitieaj ĵurnaloj siatempe anoncis la programon, kaj ankaŭ la uzotajn lingvojn por celebri la diversajn Diservojn dum tiuj tagoj, inter kiuj estis Esperanto.

La 26-an vespere okazis la Meso en Esperanto; ĝin diris Kanokino de la ĉitiea Katedralo, S-ro Francisco Fernández, helpate de S-ro Alejandro López Pobes ankaŭ Kanoniko, kaj respondis la preĝojn nombraj esperantistoj, kiuj ĝin partoprenis.

La 26-an matene aperis en la ĵurnaloj noteto en la hispana kaj en la internacia lingvoj, per kiu oni invitis al la esperantistoj partopreni tiun Meson, kaj la sekvantan tagon la ĵurnaloj raportis pri ĝi.

Tiu estis por la unua fojo, en kiu —almenaŭ en Hispanujo— oni uzis Esperanton dum internacia kunveno ne esperantista, ni esperu ke okaze de aliaj fakaj internaciaj kunvenoj, oni sekvu la ekzemplon.

---

## *FUNDACION ESPERANTO*

A las 6.100 pesetas recibidas durante los meses anteriores, tenemos que añadir un nuevo donativo de V. Bueno, Vda. de Máñez, de Zaragoza, 2.000 pesetas, que hacen un total recibido de 8.100 pesetas.

*Inés Gastón*
Secretaria de la Fundación ESPERANTO

## *Ni legis por vi...*

COMPENDIO DE ESPERANTO PARA ADELANTADOS. Daniel Cuarelo. 200 paĝoj, kun antaŭparolo de Bruno Ostropolski. Eldono de la aŭtoro, c.c 47, Suc. 13. B. Bajareso Argentino.

Tiu-ĉi libro de Quarello estas zorge presita kun tre klaraj literoj. Ĝi estas destinita al progresintoj kaj ankaŭ komencantoj. Lian metodon ni povas resumi tiel: Unue, listo de vortoj, kiun sekvas unu gramatika elemento; due, ekzercaj frazoj; trie, demandoj; kvare, interparoladoj, kaj intere, versaĵoj de Zamenhof, partoj de la letero de Zamenhof al Borovko (kopiita kun *kelkaj ŝanĝetoj*), iom da historio pri Esperanto kaj detaloj de la vivo de Zamenhof.

Certe, multo estas bona en la libro, sed jam en la dua paĝo mi trovas nesufiĉecon. Legante ke Ŝ sonas kiel franca CH: "*ŝipo* se lee *chipo*" la lernanto sendube diros *ĉipo*. Simile pri Z, Ĵ, Ĝ.

Abundas en la libro laŭdoj al Zamenhof, al lia genio, al lia verko. Eble tro. Ankoraŭ en paĝo 181: "En todos los detalles de la lengua planificada, Zamenhof dejó la impresión de una genialidad asombrosa".

Legante ke la libro estas destinita al progresintoj, mi esperis trovi en ĝi ne nur la gramatikan parton (per kiu oni ne povas paroli) sed ankaŭ la praktikan aplikadon, la Esperantan formon de la hispanlingvaj propraĵoj kaj la parolturnojn de bonstila Esperanto; sed tion mi ne sciis trovi malgraŭ la tekstoj enmetitaj ne rilatantaj tiun problemecan flankon de la hispana lingvo. Frazoj kiel: a menos que, con tal que, por más que, lo pelaron al cero, a la francesa, el contemplar su rostro, viene de cazar, a mano armada, lo bueno del caso, los encontramos visitando el jardín, según se dice, no lo he recibido hasta hoy, tras visitar el museo..., kaj dekoj da aliaj meritas pritrakton en lernolibro por progresintoj kaj eĉ por komencantoj. Tamen mi trovis pri la disdivido de vortoj en silabojn, pĝ. 163, regulojn pri la dismeto de konsonantoj al antaŭa vokalo, laŭ tio, ke la unua el ili estas L, M, R, S, Ŭ kaj la meza estas G, K, P, T! Kio, eĉ se ĝusta, neniom helpas la uzanton, kaj malhelpas pro balasteco.

La uzadon en Esperanto, de la nefacila LO hispana, la aŭtoro tute ne traktas; ankaŭ ne la trian signifon de EL por esprimi plenan agon: Ellerni lecionon, Elstudi libron; ankaŭ ne avertas pri la neuzo de prepozicioj antaŭ la infinitivo, kaj mem erare skribas: "La hundo tiris la ŝnuron *ĝis rompi* ĝin" p. 61; *ĝis koni* ĝin p. 103; *ĝis malkovri, sen dormi.*

Quarello forbalaas per la genio de Zamenhof mem la fundamentan sufikson UJ por landnomoj, kaj senĝene enŝovas "I": Polio, Urugvio, Argentinio... kiun *i* ni ŝuldas "al sentido ético y estético del lenguaje" kiun havis Zamenhof.

Kaj post la instruo, lastlinie atentigas pri ĝia neoficialeco, sed ne diras ke la Akademio malakceptis ĝin. Nu, se la sufikso por landnomoj estas *i* kaj ĝi ne estas oficiala, kion do faris Zamenhof? En p. 46 Quarello diras ke per UJ "se pueden formar los nombres de los países" anstataŭ diri "se forman", kio rivelas ian malicon.

Pri UJ koncerne la arbojn, li instruas ke *fruktujo* estas *fruktarbo*; fakte, per la nomo de ia frukto oni faras la nomon de la respektiva arbo: Pomo-Pomujo; sed ĉar *frukto* ne estas fruktonomo, *fruktujo* ne estas fruktarbo sed pli ĝuste frutera.

La pasivajn participojn Quarello traktas neklare. Apud korektaj ekzemploj troviĝas aliaj malkorektaj, kaj lia difino pri "Desarrollo anterior" estas neĝusta. Jen ekzemplo el p. 97: "Junulo estis vundita en akcidento sur la vojo". Sekvas: "La vundito estis operaciata kaj bandaĝata"; ĉar tiu-ĉi signifas "El herido estaba siendo operado y vendado", estas evidente ke la intenco estis ago perfekta, nome, "El herido fue operado y vendado" = estis operaciita kaj bandaĝita. Cetere, mi ne trovis eĉ unu ekzemplon de la Zamenhofa "...estis jam... ita".

Pri la nombroj li instruas —kaj tian logikon mi ne komprenas— ke la milojn oni skribas per du vortoj, dum la centojn kaj dekojn nur per unu; tiel: Tri mil tricent tridek!

Surprizis min la netradiciaj horesprimoj, p. 146: "estas la kvina *sen* dek minutoj" kaj "mankas kvin al la deka", anstataŭ estas dek minutoj antaŭ la kvina, kaj estas kvin antaŭ la deka.

Citindaj estas la pleonasmaj Pinarbo (Pino) kaj Jarsezono (Sezono); la misaj Ĉiufoje ke (kiam), Estis la unua fojo ke (unuafoje), de la 6-a al (ĝis) la 10-a de aŭgusto, pro tio mi necesas (bezonas) lerni, la insulanoj fumis pipon (per pipo); la kuriozaj Gesolaj, Gevivi,

Mi diris en la komenco ke multo estas bona en la libro; certe. Sed, ĉar en lernolibro de la Internacia Lingvo, ĉio, absolute ĉio devas esti bona kaj konforma al la Fundamento, tiun-ĉi Compendio de Esperanto para Adelantados, Aprobado por la Comisión de Control de Textos para la Enseñanza, oni devos revizii, ĝustigi kaj kompletigi por ke ĝi estu plene rekomendinda.

*Salvador Gumá*

---



## HISPANA TURISMA ESPERANTA-SEKCIO

## 5.ª FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

**29-30 de junio kaj 1 de julio 1973**

La Hispana Turisma Esperanto-Sekcio (H.T.E.S.) en kunlaboro kun la Grupo Esperantista de Bilbao, organizas Francan-Hispanan Renkontiĝon en Bilbao (Hispanujo).

En nia raporto pri la antaŭa Renkontiĝo okazinta en Pau, (Francujo), vi estis informitaj pri nia deziro okazigi la venontjaran renkontiĝon en Bilbao dum la tagoj 29-30 de junio kaj 1-a de julio 1973. Nun, kun ĝojo ni anoncas oficiale, la decidon, kun la espero revidi vin en tiu bela urbo de la norda Hispanujo.

La Grupo Esperantista de Bilbao, fondita en 1906, estas unu el la plej gravaj Esperanto-grupoj el Hispanujo; en ĝi bone kunfandiĝas sperto kaj vigleco, kies rezulto estas granda entuziasmo.

Kvankam ĉi tiuj sinsekvaj internaciaj renkontiĝoj estas organizitaj de francaj kaj hispanaj samideanoj, ankaŭ alilandaj esperantistoj estos bonvenaj; do, ni esperas la partoprenon de ĉiuj samideanoj, kiuj dum tiuj tagoj ferios en Hispanujo.

En venonta numero de BOLETIN ni esperas informi vin pri la programo kaj ankaŭ pri la prezo de la partopreno al la diversaj aranĝoj.

Ĉar mi bone konas la organizan kapablon de la grupanoj de Bilbao kaj la belecon de la urbo, mi povas certigi al vi tre interesan kaj agrablan restadon.

*Inés Gastón*
**Prezidantino de H.T.E.S.**

*Informas:*

En Bilbao, S-ro José Luis Bringas, Sekretario de G.E.B., Barrencalle Barrena, 7, BILBAO - 5.

En Zaragoza, Hispana Turisma Esperanto-Sekcio, ĉe Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, ZARAGOZA.

## KONGRESAJ REZOLUCIOJ DE LA XXXII-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

1. Peti de la Ministerio de Informado kaj Turismo ke la oficialaj lernejoj de Turismo enkonduku kursojn de Esperanto.
2. Peti de la Ministerio de Informado kaj Turismo ke ĝi dissendu programojn en Esperanto en la elsendoj por Eŭropo en eksterlandaj lingvoj, pere de "nacia radio".
3. Peti de la altaj instancoj de la Ministerio por Edukado kaj Scienco, la aranĝon de Esperanto-kursoj dum la somermonatoj, por profesoroj de la diversaj instrudniveloj, subvenciataj de la koncerna Ministerio.
4. Sendi telegramojn al la Ministroj por Edukado kaj Scienco, kaj Informado kaj Turismo petante ilian moralan apogon por la apliko de Esperanto en la koncernaj internaciaj rilatoj.
5. Sendi saluttelegramojn okaze de la XXXII-a Hispana Kongreso de Esperanto, al iliaj Ekscelencaj Moŝtoj la Ŝtatestro kaj la Princo de Hispanujo.

---

RESULTADOS DE LOS EXAMENES DE ESPERANTO, QUE CON MOTIVO DEL XXXII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO, SE CELEBRARON EN EL CIRCULO RECREATIVO, MERCANTIL E INDUSTRIAL DE VIGO, EL 24 DE JULIO, A LAS CUATRO DE LA TARDE

★

La comisión examinadora constituida por los señores:

D. Jaime Aragay Pujols
D. Ramón Molera Pedrals
D. Félix Navarro Clemente

ha notificado a esta Secretaría los siguientes resultados:

Han recibido la calificación de Aprobado, en el curso elemental (KAPABLA ESPERANTISTO)

D.ª Rosa Costas Bastero ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Vigo
D.ª M.ª Elvira Alvarez Iglesias ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Vigo
D.ª M.ª Amparo Sarrió Muñoz ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Valencia
D.ª M.ª Amelia de Amaral Macedo Nunes ... ... ... ... ... de Lisboa (Portugal)
D.ª María Gálvez Sánchez ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Bilbao
D. José Carlos Quintas Montero ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Vigo
D. José Manuel Blanco Caramelo ... ... ... ... ... ... ... ... ... de La Coruña
D. Francisco Martínez Iglesias ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Vigo
D. Gabriel Ruiz Mediavilla ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Bilbao
D. Ramón de Izaguirre de la Fuente ... ... ... ... ... ... ... ... de Bilbao
D. Miguel Martínez Marín ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Zaragoza
D. Lisardo Pérez Pérez ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Vigo

Han recibido la calificación de Notable, en el curso elemental (KAPABLA ESPERANTISTO)

D. Pedro Benedicto Alvarez ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Bilbao
D. Augusto Casquero de la Cruz ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Valencia
D. Jaime Martos Correia ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Lisboa (Portugal)
D. Manuel López Hernández ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... de Alicante

Lo que hago saber para conocimiento de los interesados y a efectos subsiguiente.

Madrid, 10 de octubre de 1972.
*Manuel Figuerola Palomo*
Secretario de la Federación
Española de Esperanto

---

DONATIVOS PARA BOLETIN - 1972

| | | |
|---|---|---|
| *Suma anterior* ... ... ... | 5.787 | ptas. |
| Jesús Vidal Quilis (Villatobas) ... ... | 30 | » |
| Rafael Blanes (Alcoy) ... ... ... ... ... | 80 | » |
| Tomás Alberdi (La Coruña) ... ... ... | 50 | » |
| José Serra Ramón (Botarell) ... ... ... | 50 | » |
| I. U. ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 150 | » |
| Clemente Mozas ... ... ... ... ... ... ... | 50 | » |
| Juan Olivares ... ... ... ... ... ... ... ... | 80 | » |
| J. Antonio Serra ... ... ... ... ... ... ... | 150 | » |
| Rodolfo Canet ... ... ... ... ... ... ... ... | 100 | » |
| *Total* ... ... ... ... ... ... ... | 6.527 | » |

## 57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
## KONGRESA REZOLUCIO

La 57-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenas 923 homoj el 40 landoj sub la ĉefa diskuttemo "Monda turismo kaj lingva diverseco".

KONSTATAS, ke, kvankam la monda turismo ĉiam pli vastiĝas, la lingvaj baroj malhelpas veran konon de vizitataj landoj kaj ties popoloj kaj bremsas eblan plian evoluon;

ATENTIGAS, ke samtempa kaj komputila tradukmetodoj, eĉ se ili povos esti utilaj en internaciaj konferencoj, certe ne helpos en turismo;

PROPONAS la ĝeneralan adopton de ununura lingvo por turismo kaj vojaĝa sekureco; kaj

INVITAS la registarojn kaj internaciajn turismajn organizaĵojn kunvoki tutmondan konferencon pri lingvaj problemoj en la turismo.

---

## NOVA KONKURSO DE LA POLA RADIO

10-tagaj ekskursoj tra Pollando multaj premioj kaj objektaj memordonacoj

Partopreni la lotadon de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la subaj demandoj:

1/ Kion —laŭ via opinio— speciale oni devas entrepreni, por ankoraŭ pli disvolvi la internacian pacan kunlaboron?

2/ Kiuj eventoj —laŭ via opinio— aparte kontribuis al la evoluo de la kunlaboro inter Pollando kaj via lando?

3/ En kiu sfero —laŭ via opinio— ekzistas la plej grandaj ebloj disvolvi la kunlaboron de niaj ambaŭ landoj?

La leterojn oni devas sendi al la adreso: POLA RADIO, Warszawa 1, P.O. Box 46, Polska, en kovertoj signitaj sure per la atentigo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro 1972, decidas la dato de la poŝta stampo.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj la 31-an de januaro 1973.

La ekskurso de laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de Pola Radio.

Ni deziras al vi sukceson en la lotado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn. Ni antaŭdankas.

POLA RADIO

---

### NUEVA CALLE ESPERANTO

El Ayuntamiento de Málaga ha informado a la Directiva de la Federación Española de Esperanto, el acuerdo de dar el nombre ESPERANTO a una calle de aquella ciudad andaluza. La calle estará situada en el Polígono de la Alameda.

La Directiva de la Federación agradece al Excmo. Ayuntamiento de Málaga por su acuerdo y a las personas que en su tiempo solicitaron esta concesión y que han intervenido para lograr el feliz éxito.

TIP. C. BOLOIX.-REINA FABIOLA, 7.-ZARAGOZA

D. L. Z. -375 - 63